



Venontaj eventoj

👉 **Hodiaŭ** 👈

- ★ **1:30 ptm:** Ekskurso: akvario Birch. Renkontiĝu antaŭ la loĝejoj. Bonvolu esti akurata; ni ne povos atendi vin!
- ★ **7:30 ptm:** Tabul-ludoj en la komuna salono

Sabato

- ★ **11:00 atm:** Ekskurso: Urbocentro de La Jolla kaj la golfeto La Jolla Cove. Renkontiĝu antaŭ la loĝejoj.

Dimanĉo

- ★ **11:00 atm:** Ekskurso: plaĝo Black's Beach. Ni malsupreniros la krutan ŝtuparon apud la glisilejo. Renkontiĝu antaŭ la loĝejoj. Kunportu sunkremon kaj tukon.
- ★ **7:00 ptm:** Ekskurso: fajraĵoj en La Jolla. Renkontiĝu antaŭ la loĝejoj. (Vidu ankaŭ la priskribon sur paĝo 2.)

Lundo (ferio-tago)

- ★ **11:30 atm:** La KER-ekzamenoj komenciĝos en AP&M ĉe la 4-a etaĝo, kie okazis la malfermo de la kursaro.

Mardo

- ★ **11:00 atm:** Skajpumado inter NASK (meznivela klaso) kaj SES en Slovakujo

La NASKa Fasko

Redaktejo: Asante n-ro 116
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko aperas lunde – vendrede dum la kursaro. Kutime ĝi aperas tagmeze. Se vi ne ricevas ĝin post la matenaj klasoj aŭ en la manĝejo, prenu ekzemplon el la skatolo kiu troviĝas sur la fenestro de la redaktejo.

Ni avide atendas viajn artikolojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, poemojn, viajn am-leterojn... preskaŭ ion ajn! Memoru, la Fasko estas taggazeto **por vi kaj pri vi**: viaj kontribuoj igas ĝin interesa. Do nepre kontribuu!

Se vi ne sentas vin tute kompetenta pri verkado, ne timu; ni volonte helpas vin korekti kaj poluri. Serĉu unu el niaj lingvo-helpantoj; sur siaj nomŝildoj ili portas specialajn glumarkojn kun rideto (☺) – kaj ili ridetante helpas vin korekti, poluri, kaj plibonigi vian verkon. Kiam la verko pretas, sendu ĝin per retpoŝto al la adreso supre, aŭ simple portu ĝin piede al la redaktejo.



Je la **1:30 ptm** ni ekskursos al la belega akvario Birch. La vojaĝo tien bezonos 20 minutojn da malstreĉa promonado; la buso helpos, sed nur iomete mallongigos la vojon. La enirkosto estas po \$8. **Nepre kunportu vian studentan karton**, kaj ankaŭ vian fotilon, se vi havas.

Bananomanioj kaj bananomankoj

de Katalin KOVÁTS

En la lando de la leviĝanta suno nuntempe mankas bananoj. Ŝajne la bananomanko konstateblas ankaŭ en Sandiego.

En Japanujo oni amase aĉetas bananojn ĉar disvastiĝis nova malgrasiga dieto, el-laborita de Sumiko WATANABE, apotekisto el Osako. La baza ideo estas, ke oni manĝu matene unu nematuran bananon kaj trinku varmetan akvon. La facileco de la metodo estas, ke dumtage eblas manĝi kion ajn krom dolĉaĵo. Laŭdire banano entenas multe da nedigesteblaj materialoj, kiuj ne enkonstruiĝas en la korpon, sekve ne dikigas, sed tamen donas la senton de pleneco en la stomako. La amasigita

fekulo en la korpo stimulas la bruligon de la graso.

Pri la dieto favore parolas famaj amas-komunikilaj steluloj kaj tio multobligas la frenezigon. Japanujo altigis je 25 procentoj sian bananimporton, sed ne kapablas kovri la subite kreskiĝintan bezonon. Kompreneble ankaŭ la prezo de la banano altiĝis ĝis la ĉielo.

Ĝis nun la dieto apenaŭ estis konata ekster Japanujo, certe ne en Usono. Drasta malapero de malmaturaj bananoj el la Café Ventanas observ-eblas nur ekde la NASK-kursaro. Tute strange tamen, ke kulpas ne niaj du japanaj amikoj. Ĉu vi rimarkis, kiu sekvas manie la japanan dieton?



Ĉu ni faru grupan libromendonon?

Ofte dum NASK ni komune mendas librojn de la libroservo de Esperanto-USA por minimumigi sendokostojn kaj ricevi rabatitajn prezojn pro amasa aĉeto. Ĉu vi dumlonge sopiris al iu vortaro, lernolibro, novelaro, ktp? Jen via ŝanco mendi iom malmultekoste. Se entute ni mendos pli ol tri librojn, kiujn eldonas Esperanto-USA, ni ricevos trionan rabaton por ĉiuj.

Jen listo de kelkaj libroj en la retbutiko. Vi povas trarigardi la tutan katalogon ĉe:

<http://esperanto-usa.org/retbutiko>

- *Being Colloquial in Esperanto (a reference guide)* de David K. JORDAN. 235p. Malmola bindaĵo. \$15.00
- *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* de Peter J. BENSON. 607p. Mola bindaĵo. \$27.00

• *Esperanto: Learning and Using the International Language* de David RICHARDSON. Malmola bindaĵo. 368p. \$15.00

• *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* de Bertilo WENNERGREN. 696p. Malmola bindaĵo. \$27.00

• *Step by Step in Esperanto* de Montagu C. BUTLER. 281p. Malmola bindaĵo. \$13.00

Se vi volas partopreni en la komuna mendo, sciigu tion kiel eble plej baldaŭ al Hoss.

Cetere, Liĉjo vendas unu ekzempleron de la nova vortaro English-Esperanto-English fare de John WELLS. La kosto ĉe Amazon estas \$26.97, sed Liĉjo povas vendi kontraŭ \$26. Temas pri la malmole (papere) bindita versio.

Salutmesaĝo de profesoro Duncan CHARTERS

Venontsemajne d-ro Charters instruos en la supera kurso.



Karaj NASK-anoj, Estas por mi aparta plezuro vin antaŭsaluti, ĉar mia vizito dum la dua semajno donos al mi la okazon instrui denove en NASK en ĝia nova hejmo. Mi komencis instrui en

1970 kiel unua helpanto de la unua ĉefinstruisto, poeto kaj akademiano William AULD, en San-Francisko (SFSU), kaj poste diversokaze rolis en la sekvaj NASK-kursoj en la Universitato de San-Francisko kaj en SIT (la lernejo por internacia trejnado) en Brattleboro.

Mia ĉi-jara kolego Amri WANDEL estas feliĉa parto de tiu historio, kiu daŭras ĉiam kun novaj kombinoj de kursanoj kaj studentoj. Laŭ mia sperto neniam mankis la unika spirito kiun nutris Cathy SCHULZE dum la jaroj kiam ŝi invitadis al siaj per-

poŝtaj kursanoj kunhavi vivŝanĝan sperton kiu malfermus al ili la plenajn eblecojn de ilia ĝis tiam nur kabineta lingvo.


Inter la temoj kiujn ni povos pritrakti en la semajno kiam mi instruos al la supera klaso kaj ankaŭ helpos al Katalin pri la ekzamenado, estas la jenaj. Ili okupis mian atenton en antaŭaj jaroj sed pli specife lastatempe. Pripensu la temojn kiuj plej interesas vin, kaj kiom da tempo vi deziras dediĉi al ili, kaj la unuan klastagon ni diskutos, negocos, kaj aranĝos!

1. Ivo LAPENNA: kial li tiom gravis por la Movado ĝenerale kaj specife por la antaŭenigo de la instruado de Esperanto? Tiun temon mi lastatempe esploris kaj prezentis en Malferma Tago ĉe UEA, kaj pretas priskribi ankaŭ personajn spertojn kun li.
2. La florado de la kataluna movado kaj la kataluna literaturo en Esperanto. Mi prezentis la temon en "The Louisville Conference on Literature and Culture"

en februaro ĉi-jare por panelo pri Esperanto kun Humphrey TONKIN, Bonnie FONSECA-GREBER, kaj Frank NUESSEL.

3. La kialo legi literaturon en Esperanto. Mi deziras ke la kursanoj mem unue prilaboru tiun temon el sia propra sperto kiel bazon por diskutado, kaj se io restas por diri, mi aldonos! Eseo mia pri la temo jam aperis en la festlibro de Humphrey TONKIN eldonita ĉi-jare.
4. Kio estas la nova ekzamsistemo kreita laŭ la Eŭropaj normoj, kaj kiel ĝi kompareblas kun la sistemo ACTFL de Usono. Kial gravas normigo de ekzamsistemoj por Esperanto?
5. La instruado de interkultura kompreniĝo: ĉu manko en la lernado pri Esperanto kiel lingvo? Ni pripensu kio estas kulturo, kaj kian kulturon havas aŭ povas peri Esperanto.

Ĝis baldaŭa (re)konatiĝo!



Semajnfinaj ekskursoj

- **Sabaton** ni iros buse al la centro de La Jolla, luksa urbeto kun plaĝo, golfeto (*supra foto*), muzeoj kaj multaj vendejoj, eĉ vendejoj por harkovritaj, Esperanto-parolantaj eksterteranoj (*malsupra foto*). De la urbetocentro ni dividiĝos laŭvole por iri individue aŭ grupe al la diversaj allogaĵoj.
- **Dimanĉon je la 11-a horo**, espereble kun partopreno de la suno, Hoss kondukos homojn al la glisilejo kaj poste malsupren laŭ la kruta ŝtuparo al la plaĝo *Black's Beach*. Kunportu kontraŭsunan kremon!
- **Dimanĉon vespere** post sunsubiro okazos fajraĵoj (piroteknikaĵoj) en La Jolla por festi la usonan tagon de sendependiĝo. Por tiuj, kiuj ne emas multe marŝi, la glisilejo estas bona loko por spekti la aferon, sed ĝi estas iom for de la fajraĵoj. **Je 7:30** ni trafos buson al la domo de d-ro David JORDAN, kiu piede kondukos nin laŭborde al la centro de ĉio. La spektaklo okazos je la 9-a horo, do ni revenos en mallumo; kunportu poŝlampojn se vi havas.



Forpaso de Jerry NEWALL

De Mar CARDENAS
(*Mar estas NASK-partopreninto kiu loĝas ĉi tie en Sandiego. —Red.*)

Kun profunda malĝojo mi ŝatus sciigi vin pri la forpaso de longtempa membro de la Esperanto-Grupo de San Diego.

S-ro Jerry NEWALL estis ankaŭ la patro de kunlaborantino mia. Ni ĉiuj estas unitarianoj.

En nia teologia tradicio ni ne havas funebrajn ceremoniojn sed vivcelebradojn. Lia vivcelebrado okazos ĉi-sabate je la 2-a ptm ĉe la unitariana preĝejo de San Diego.

Se iu el vi ŝatus veni kun mi por celebri la vivon de esperantisto kiu multe amis kaj apogis nian movadon dum multaj jaroj, bonvolu telefonvoki min per (619) 947-4612 aŭ sendu retmesaĝon al la adreso <amikema@aol.com>.